

Malĉeesta sesio

En la jaro 2011 estas novaj teknikoj.

En la jaro 2011 Eŭropo ne donas vizon al iu junulo el Afriko.... Do vojaĝi malfacilas.

En la jaro 2011 flugoj kostas, restado kostas... Do vojaĝi malfacilas.

Pro tio ni pripensis pri ekzamenoj malĉeestaj.

En la sekva teksto li signifas li kaj ŝi.

LEK

En la koncerna lando devas esti unu persono membro de Internacia Rajtigita Ekzamenantaro (IRE). Ĉi-sube : IRE-LEK-membro.

Se estas du aŭ tri por formi la Lokan Ekzamenan Komisionon (LEK), bonege. Tamen povas esti alia solvo : la IRE-membro venigu unu surlokan lingvoinstruiston, du se eblas. Unu devas esti, du povas esti. Tiu aldonita LEK-membro ne estas esperantisto, sed kutimas instrui lingvojn kaj testi kandidatojn. Do naskiĝas novstila LEK. Tiu neesperantista LEK-ano povos kontroli la disvolviĝon de la ekzameno kaj povos ekscii pri nia lingvo. Do samtempe kontrolo kaj informado.

Sube :

IRE-LEK-membro = membro de IRE kaj de LEK

LEK-membro = neesperantisto

Sesio

La sesio devas esti ununivela, ne dunivela.

Maksimuma kandidatonombro : 5.

Gramatika testo

Tiu testaro en kvin partoj estas la unua paŝo al ekzameno. Ĝi utilas, ĉar iu kandidato povas tro alte taksi sin. IRE-LEK-membro kaj LEK-membro korektas la testojn laŭ solvo-folioj.

Skriba parto

Ili okazas en iu taŭga loko sub kontrolo de LEK. Daŭro : kvar horoj.

IRE-LEK-membro devas ĉion mastrumi : gardi la materialon strikte konfidenca antaŭ la ekzamenoj, fotokopii, disdoni, observi la disvolviĝon, observadi la laboron, skanadi, sendi al 2 foraj IRE-membroj.

Korektado

Post skanado testoj devas esti senditaj al du korektantoj IRE-membroj en la mondo, kiuj ĉion korektas same kiel la IRE-LEK-membro. Do naskiĝas korekta skipo el tri personoj, tiu skipo ne rajtas esti samkontinenta nek samlingva (minimume du lingvoj kaj du kontinentoj devas esti reprezentataj). Same la IEK-membro ricevas ĉion kaj ĉiujn informojn rilate al la skriba parto. Per skajpa konferenco skriba, la tri IRE-membroj kaj la IEK-membro informu unu la alian pri la rezultoj, diskutu pri la poentoj kaj konstata la rezultojn.

Parola parto

Ĝi okazas per skajpo. Tio estas, ke la IEK-membro vidos kaj aŭdos la kandidaton. La IEK-membro povas demandi la kandidaton pri lia eseo kaj aliaj testoj, ĉar li ricevis ilin skanitajn.

Okazas normala parola parto, kies daŭro estu 20 minutoj aŭ pli, ne malpli.

Fina sintezo

Per skajpa konferenco skriba, la tri IRE-membroj kaj la IEK-membro informu unu la alian pri la rezultoj, diskutu pri la poentoj kaj konstata la rezultojn.

Pri IEK-membro

Unu persono el IEK povas trapasigi tian sesion kunlabore kaj interkonsente kun la tuta IEK. La decido pri tia sesio devas ricevi aprobon de la simpla plimulto de IEK (do 4 voĉoj aŭ pli el 7).

Teknikaj problemoj.

Nepre oni faru antaŭe (unu – du tagojn antaŭe) provon por kontroli la konekton.

Nepre oni studu pri la tempo kaj horodiferenco kaj faru precizan rendevuon.

Nepre la IEK-membro vidu kaj la kandidaton daŭre kaj la LEK-membro/j/n mallonge komence.

Laŭ mia sperto okazas nun kun Afriko, ke venas per skajpo aŭ la sono aŭ la bildo ; sed ni povas esperi rapidan pliboniĝon de la situacio.

Laŭ mia sperto estas nun tiel, ke nur du komputiloj povas esti en rilato. Se tio pliboniĝos, ni povos postuli, ke du aŭ tri membroj de IEK partoprenu la parolan parton (videokonferenco ; nuntempe tia konferenco kostas, dum skajpo neniom kostas).

Tiu skanado kostas monon por tiuj, kiuj faras tion en retkafejo. ILEI devos krei subvencion por tio.

2011-08-31 Akceptita fare de IEK

Mirejo Grosjean, prez de IEK